Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
januaro-februaro 2012, n-ro 01-02 (1279-1280)


# Sennaciulo

## Tem-dosiero "Amaskomunikiloj" – paĝo 6




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Jalto, lulilo de la tutmonda E-movado




Fine de la 19-a jarcento, dum la frupioniraj tempoj, en Jalto, Odeso kaj Sankt-Peterburgo estis la plej aktivaj E-grupoj. Jalto estas nura urbo en la tuta eksa Sovetunio, kie estas 2 memortabuloj omaĝe al E-pioniroj.

La unua esperantisto en Jalto aperis en jaro 1892, li estis d-ro Ilja Ostrovskij, kuracisto de fama rusa verkisto Anton Ĉeĥov. En 1893 li estis jam la plej aktiva E-varbanto en la mondo. Sufiĉas mencii, ke en tiu jaro inter malpli ol 800 abonantoj de la unua E-gazeto La Esperantisto, 100-on varbis li.

En 1905, li la unua ricevis permeson eldoni rusian E-gazeton kaj ekredaktis ĝin. Estis li, kiu samjare en la unua U.K. iniciatis oficialan akcepton de E-flago. Sur lia domo, kiu konserviĝis ĝis nun, estas establita marmora tabulo omaĝe al li kaj ĉiam pendas E-flago.

En 2002, estis 100-jara jubileo de jalta publika biblioteko, kaj jaltaj esperantistoj eltrovis, ke ĝia fondinto kaj unua direktoro estis E-pioniro Nikolao Borovko, konata pro fama letero de Zamenhof pri deveno de Esperanto, kiun li skribis responde al N. Borovko.

N. Borovko estis kunfondinto de la unua E-klubo en Rusio en Odeso kaj prezidanto de la unua Rusia E-societo "Espero" en Sankt-Peterburgo en jaroj 1896-97. N. Borovko estis "patro" de originalaj Esperanto-noveloj, kiuj aperadis en La Esperantisto ekde 1891. Sur konstruaĵo de la unua biblioteko, nun pendas marmora tabulo omaĝe al li kiel unua direktoro kaj pioniro de E-movado.

Ankaŭ lia edzino Antonina Ĉajkovskaja estis fama E-pioniro. En 1894 ili kune organizis balotadon pri reformoj en Esperanto, kies rezulto estis, ke Esperanto restis netuŝita.

Ilia filino Nina en 1925 iĝis edzino de fama esperanta pioniro, svedo Valdemar Langlet – unua E-vojaĝanto, redaktoro de la dua E-gazeto Lingvo internacia, unua prezidanto de sveda E-federacio. En 1944-45, V. Langlet estris en Budapeŝto svedan Ruĝan Krucon kaj kune kun Nina savis de faŝistoj milojn da homoj. En jaro 2002, la geedzoj Langlet estis nomitaj honoraj civitanoj de Israelo. ★

*Jefim Zajdman*

# Enhavo


Jalto, lulilo de la tutmonda E-movado 2
Redaktangulo 4
Jam komenciĝis la jaro 2012… 4
Venontaj temaj dosieroj 4
**SAT-aj Diversaĵoj 5**
Novaliĝoj 5
Nekrologo 5
Nova peranto por Belgio 5
Kotizoj kaj abono 5
Malaltiĝo de la vendoprezo de PIV 6
Jalta SAT-Kongreso 2012: pliajn informojn 6
Aforismoj – Cerbaj impulsoj – DoMo 6
**Tem-dosiero "Amaskomunikiloj" 7**
El Grekio atestas indignulo 7
Miaj spertoj pri amaskomunikiloj 8
Amaskomunikiloj senvualigitaj per dokumentfilmo 9
Ĉu ni estas manipulitaj de amaskomunikiloj? 10
Ĉu nuraj komunikilaj mensogoj aŭ pli ĝeneralaj manipuladoj? 11
Informiĝi postulas tempon… kaj sagacon 12
Informa manipulado pri la milito en Libio 13
**SAT vivas, debatas agadas 15**
La dom-okupado – ilo por politika liberigo 15
Liberigu niajn kvin heroojn 16
Post katastrofo en Fukuŝimo – rajto je forfuĝo 17
Ĉu Diablo fariĝos SAT-ano? 18
Besta kondiĉo kaj socia justeco 19
Helpu al prilaborado de kongresaj tajpaĵoj 20
**SAT kulturas 21**
*Pierre Bourdieu*, engaĝiĝinta sociologo 21
Karmen' - Kvina kaj lasta parto 23
Esperanto-teatro ĝuas bonan reprezenton en Jalto! 24
Libreto pri Gurs 25






**Praktikaj informoj**

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97

Retadreso: satesperanto@free.fr

Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

**Plenum-Komitato de SAT**

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Tereza Sabatier

Kasistino: Franjo Lévêque

Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent

**Sennaciulo**

Ĉefredaktanto: Robin' Beto

Enpaĝiganto: Pierre Soubourou “Ŝtonĉjo”

Ceteraj redaktantoj: Kreŝo Barkoviĉ, Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale.

**Kontribuojn sendu rete al:**

sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paperpoŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

★ Ĉiujn demandojn pri financaj aferoj sendu al: franjo.leveque@gmail.com

★ Libromendojn sendu al: libroservo@sat-amikaro.org

★ Eldonproponojn sendu al: pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart, Francio. Aperas dumonate – Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57€, autres pays / aliaj landoj: demander le tarif à notre agent du centre de SAT / peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépôt légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567

## Jam komenciĝis la jaro 2012...

...kaj la mondo plu tremetas, skuiĝas. La homoj denove ekstaras, elpensadas, novajn sociajn eksperimentojn realigadas. La idealoj longtempe kuŝintaj funde de niaj koroj, dormetintaj sub tavolo da enuo kaj sur kuseno da komforto, jam revigliĝas.

Ho! Kompreneble, ne tuj ni povas ekfidi je niaj idealoj; ili estis tiom ofte pritraktataj kiel belaj neatingeblaj revoj, nerealigeblaj utopioj (tiagrade, ke termino "utopio" en la moderna lingvaĵo signifas "nerealigeblo") aŭ belaj sed naivaj iluzioj, ke ili ne emas tro rapide kaj brue eliri el sia kaŝejo. Tamen, iu ondo trakuras la mondon, prenante multdiversajn aspektojn laŭ loka kondiĉaro, kaj levante multajn demandojn.

Inter tiuj demandoj, staras plej aktualece tiu pri efiko de la amaskomunikilaro. Ni ja iluziiĝis pensante, ke ju pli grandos la inform-reto, des pli kreskos la inform-libero. Hodiaŭ, pri tio, kio grava el socia vidangulo okazas sur nia planedo, ni malfacile povas elsarki inform-elementojn, el vasta propagand-nebulo disetendiĝanta sur la tuta globo kaj remaĉanta la samajn ŝablonojn, kiu ajn estus la lingvo. Pro tio, ni prezentas dosieron pri rolo de la amaskomunikilaro - tiu dosiero eble starigos ĉe vi ankaŭ demandon: kiun rolon havu *Sennaciulo*? Jes, *Sennaciulo* estas informilo!

Per nia komuna lingvo ni ja povas cirkuligi informojn kaj atestojn pri kio okazas ĉirkaŭ ni... tutmonde! Ni kune transpasu kaj transpasigu al niaj konatoj la propagandajn kaj lingvajn barojn (kiujn la interreto absolute ne ebligas transiri, kvankam la impreso de multaj uzantoj estas "mi havas aliron al la tuta mondo!"). SAT-anoj, kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agad-kapablo diris Lanti... Nu, ĉi tion deziras la redaktoskipo al vi por jaro 2012!

*Lastminuta aldono:*

Kara leganto, ni pretigis kaj sendis al vi ĉi tiun numeron treege malfrue. La kialoj estas ĉefe organizaj. Mi plej forte deziras ke la venonta dosiero atingos vin en la normala lim-dato. Plie, vi povas konstati, ke malmultajn kontribuojn ni ricevis ĉifoje, kaj pro tio ĉi ni prezentas al vi 28-paĝan numeron. Sekve, ni forte instigas vin verki artikolojn, fotojn kaj desegnojn pri la temoj interesantaj vin. Ĉi tiu revuo povas vivi nur pere de via partopreno!

## Venontaj temaj dosieroj

Por riĉigi nian revuon, kaj por ampleksigi nian agad- kaj sci-kampojn, ni plu regule organizas temajn dosierojn. Le jenaj temoj, kun ties lim-datoj por sendi viajn kontribuojn, estas jam planitaj:

1 Ateismo - (limdato por ricevo de artikoloj: 25-a de marto 2012 - kunordigo: Ŝtonĉjo pierre.soubourou@gmail.com): Signifo, deveno, uzo, historio de la vorto k koncepto kun ties diversaj nuancoj, "magia pensado" kontraŭ "ateisma pensado", aktualeco de ateisma lukto, famaj / interesaj ateismuloj: Riĉard Davkins (angle Richard Dawkins)...

2 Radio kaj Esperanto - (limdato por ricevo de artikoloj: 25-a de majo 2012 – kunordigo: Robin' BETO robin.beto@laposte.net): Vi jam kontribuis (aŭ revis kontribui...) al radi-elsendo esperant-lingva... Kiujn temojn vi tuŝis aŭ deziras tuŝi? Kiujn malfacilojn vi trafis? Kiujn sukcesojn vi atingis? Kiujn revojn vi havas pri radi-elsendo esperant-lingva? Por kio kaj kiuj vi radi-elsendas/-os/-us? Rakontu al ni... ĉifoje skribe!

3 Katastrofo de Fukuŝimo: Ĝiaj sekvoj - (limdato por ricevo de artikoloj: 25-a de julio 2012 - kunordigo: Robin' BETO robin.beto@laposte.net).

4 Publikaj servoj: kiel evoluas la situacio en via mondparto? (limdato por ricevo de artikoloj: 25-a de septembro 2012 - kunordigo: Robin' BETO robin.beto@laposte.net)

Ĉiaj kontribuoj (artikolaj, desegnaj, fotaj ktp) estu senditaj al la kunordiganto, kiu transdonos ilin al la redaktejo.

Vin tre interesas iu temo? Certe ne nur vi interesiĝas pri la temo. Proponu vian temon por ebligi reciprokan klerigon: skribu al la redaktejo ĉe (sennaciulo.redaktejo@gmail.com)!

*Robin' BETO*